RADIO HABANA CUBA
Artículo Editado por Maritza Gutierres González
10/06/2016 08:29:36

Rolo de la kuba junularo en la kulturpolitiko.

Ĉi-semajne sesias la tria plenkunsido de la nacia komitato de la organizo de junkomunistoj en la kongresa centro Lázaro Peña de la naciaj sindikatoj.

Joan Cabo Mijares, membro de la nacia buroo de la politika organizo, konfirmis ke la temoj analizataj kaj debatataj estas la ĉeesto kaj laboro de la gejunuloj en la kultura politiko de la lando; la defendo de la naciaj valoroj kaj identeco, la kubaneco, kiel garantiilo de la historia kontinueco de la revolucio.

La kulturo kiel armilo kaj ŝirmilo fronte al la nunaj kaj estontaj defioj: temas pri tio, emfazis la juna gvidanto; analizi la organizan raporton pri la plenumo de la interkonsentoj de la 10-a kongreso de la organizaĵo okazinta en julio de 2015 kiam estis elektitaj la 103 membroj de la nacia komitato.

Ili ankaŭ pritraktas la partoprenon de la membroj kaj la junularo en la popola konsultiĝo kunvokita de la komunista partio por pliriĉigi kaj perfektigi la projektojn kiuj konceptigas la modelon ekonomian kaj socian de la lando kaj la nacia plano de evoluo ĝis la jaro 2030 aprobitaj en la 7-a kongreso de la partia organizo.